

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :- :-

Denove pri la plioftigo.

Jes. denove mi devas skribi pri tio, kio jam multfoje estis pridiskutata, preparolata, kaj... la situacio restis la sama. Mi celas la plioftan aperigadon de I. S. R.

Post mia „Alvoko” (vidu la junian n-ro) la redaktoro ricevis dekon aŭ pli da aprobantaj leteroj (vidu la noton de la R-ĉio en la julia n-ro). Nur unu kamarado proponis prokrasti la plioftigon ĝis la nova jaro. Por fine solvi la aferon la redakcio petis (en la julia n-ro) ĉiujn agentojn de la I. S. R. esprimi siajn opiniojn. Sed ĝis nun nenio estas konata.

Se la redaktoro ricevus iujn ajn leterojn rilate al tio ĉi, li certe sciigus al ni tion per la gazeto. Sed tion li ne faris, evidente la agentoj silentas. Estus ĝojinde, se en tiu ĉi okazo estus vera la proverbo: „La silentado estas signo de konsento.” Sed se kontraŭe? Kial do ne esprimiĝas la kamaradoj-agentoj? Se ili ne trovas necesa la plioftigon, ili klarigu la motivojn, alie — ili konsentu!

Mi ne plu prezentas motivojn por la plioftigo, estas jam multe parolita pri tio ĉi, mi nur denove volas alvoki la gelegantojn, precipe la agentojn, de nia organo: ne restu egalanimaj, esprimu viajn opiniojn, kaj almenaŭ deponi la nova jaro ni aperigu 2 fojojn monate nian gazeton.

G. SEIDLER.



Pri anĝeloj de paco.

I. PRI FALINTA ANĜELO DE PACO.

Okazis antaŭ kelkjaroj, ke el ĉielo malsupreniris anĝelo por alporti sur la tero: pacon.

Kial ne antaŭ nun? Kial ne mil jaroj pli frue?

Vi ne diru, ke antaŭe la homoj estis tro kruelaj, ke nur hodiaŭ ili estas sufiĉe dolĉkoraj, tutplenaj je amo al proksimumo, k.t.p. Ĉu ne miloj senspire rigardas en cirko baraktojn inter intence instigitaj bestoj? Ĉu ni ne treege amuziĝas, se en bioskopo oni eble plej laŭnature imitas la agonion de l' pereantoj de „Titanic”? Kaj demandu al la bestoj, kion ili pensas pri la nuntempaj homoj!

Ne, la vera kaŭzo sendube estas alia, sed, la konsideroj de l' ĉielanoj perdiĝas en ombroj. Ni do lasu ĝin.

Alveninte en la sublunaj kamparoj, la anĝelo unue sin demandis, al kiu ĝi devos sin turni por atingi la celon?

Ŝajne estis memkompreneble, ke ĝi unue devus iri al la pastroj en la preĝejoj, kie ĉiujare oni kantas: „Paco estu sur tero”. Sed la anĝelo bone memoris, ke tiuj samaj pastroj en ĉiu milito rapidas beni la mortigilojn kaj prezenti la sangverŝon kiel aferon agrablan al ĉielo.

Momenton ĝi pensis al la socialistoj, al la ruĝa Internacio. Sed ties pacemo sin kaŝas en tre militema terminaro — la anĝelo memoris vortojn, kiaj „klasbatalado”, „konkuro de l' pano” k.t.p. — kaj ĝi ne povis imagi, ke tiu estus la bona adreso. Krom tio, ĝi komprenis, ke tiu senpotenca manpleno da uloj ja ne povas decidi pri milito aŭ paco.

Pli bone estus, sin turni al iu potenculo, kaj persvadi lin helpi al la atingo de l' celo.

Tiel okazis, ke nia anĝelo sonoris ĉe la palaco de paĉjo la caro.

Tiu paĉjo, en ordinaraj cirkonstancoj, simple estus ordonanta al siaj kozakoj, knutbati la anĝelon for de la pordo. Sed, tiu inda persono estis, hazarde, en tre pacema humoro. De ĉiuj flankoj oni turmentis lin per kvitancoj. La unu deziris pagon por tiom da kanonoj liveritaj lasttempe; la alia enuigis lin kun petoj pri la rento por duonmiliardo da rubloj, pruntprenita por konstrui serion da ferhaŭtaj militŝipoj. Kaj tiel plu, senfine. Ĉiutage kreskis la nombro kaj la malpacienco de la kreditoroj. La paco-anĝelo do ŝajnis al li vera savanta anĝelo.

— Fraŭlino, li diris al ŝi, nenio estus al mi pli agrabla

ol kontentigi vian deziron. Se mi estus imperiestro de l' tuta mondo, anstataŭ nur rusa careto, tiam mi jam morgaŭ metus flanken la tutan mortigilaron, kaj ĉiujn fabrikistojn de militaĵoj mi sendus al la diablo, aŭ al Siberio, kio estas la sama. Nun mi ne povas fari por vi pli ol doni leteron de rekomendo por la sinjoroj diplomatoj, en kies manoj estas vivo kaj morto de l' popoloj. Kaj krom tio, mi igos skribi por vi tre belan, tre afablan leteron.

La anĝelo de paco estis ravata pro la afabla akcepto. Kaj kun la imperiestra letero en sia poŝo, ŝi kontinuus sian vojon.

Sed, o teruro! kiam vespere ŝi rigardis sin en spegulo, ŝi rimarkis ke ŝiaj vestoj ne plu estis purblankaj. Sur ili ŝi trovis eĉ makulojn de sango. Pri tio ŝi miris, ĉar ŝi ja estis en princa palaco, ne en buĉejo!

La unua diplomato, kiun ŝi vizitis, akceptis ŝin iom malpacience. Sed kiam ŝi montris la leteron de paĉjo, li tuj fariĝis tute afableco.

— Fraŭlino, li diris, ni kunvokos konferencon kaj ni invitos ankaŭ vin. Estos al ni grandega ĝojo, esti de vi konvinkata. Sed... ĉu mi, homo de sperto, povas doni al vi utilan konsilon? Jes? Nu, vi permesu, ke mi forigu tiujn plumojn de via dorso. Vidu, ni vivas, bedaŭrinde, en tempo materialista, kaj tiaj flugiloj donas al vi ion superteran, ion superidealistan — tio malfortigos la impreson de via vorto; estu certa... Vi permesas?...

Kaj li senplumigis tute nian anĝelon.

La dua diplomato ne estis malpli afabla.

— Ĉarma fraŭlino, li diris, viaj deziroj estos por ni tiom da ordonoj... Sed, vi permesu al mi rimarkon negravan sed tamen ne sen graveco, pri via eksterajo, via aspekto. Vi ne scias, de kiom da influo povas esti la ekstera aspekto de virino; tio multe pli konvinkas ol la plej elokventa vorto... Kaj jen vi havas... kiel mi esprimos... vi havas en viaj trajtoj ion severan, ion seriozan... sed afabla rideto, jes, iomete koketa, eĉ iom alloga kaj kuraĝiga... tio farus miraklojn por via sankta afero...

— Ĝis nun mi ne havas multe da motivoj por rideti, diris la anĝelo.

— Vidu fraŭlino, vi ne devas paroli tiom logike, tiom saĝe... oni ne ŝatas tion ĉe virino... oni preferas aŭdi de ŝi ĉarman sensencaĵon; pripensu: la celo sanktigas la rimedojn... afabla rideto farus vin nekontraŭstarebla... Permesu min esti via instruisto."

Kaj kiel bone dresita sencerbulino la anĝelo iris, iom poste, al la aliaj diplomatoj.

Ĉie oni estis afabla; sed post ĉiu vizito, io ĉe ŝi estis aliigita. La unu donis al ŝi gantojn, la alia anstataŭis ŝian aŭreolon per falsa hararo. Fine, ŝi ne plu povis rekoni sin mem.

La konferenco kunvenis. Sed oni forgesis inviti la anĝelon. Tial ŝi, fine, iris, neinvitite.

— Kiu vi estas? demandis la pordisto.

— Mi estas la anĝelo de l' paco.

— Hm, nun, ke estas tie packongreso, la tuta urbo estas plena je tiaj anĝelinoj... sed, ĉi tie eniri ili ne povas... post la kunsidoj estas sufiĉe da okazoj por tiuj aferoj... Se vi volas paroli unu el la sinjoroj, tiam iru al lia hotelo... aŭ atendu apud la elirejo... se vi almenaŭ volas promesi, ke vi ne faros skandalon... kaj se vi sukcesas, tiam ne forgesu la malriĉan pordiston...

La anĝelo donis trinkmonon al la pordisto, kaj atendis.

La diplomatoj jam ne konis ŝin. Nur unu bonvolis memori pri ŝi. Li interkonigis ŝin kun la delegitoj. Ŝi diris:

— Sinjoroj, mi estas la anĝelo, veninta el ĉielo, por starigi pacon sur la tero. Mi...

Generala ridado superonis ŝiajn vortojn.

— Ni petas, fraŭlino, ne... ne tiom serioze, ne tiom solene... Ni ja ne kunvenas por eni! Allo, iru kun ni; hodiaŭ tagmeze ni havos boatekskurson, hodiaŭvespere grandan festmanĝon kun koncerto, poste ni iros kune al la ekspozicia kermeso en Amsterdam, kie oni povas amuzi sin kiel en nokta Parizo. Morgaŭ ni havos ankoraŭ pli densan programon. Do, ne faru tiom seriozan mienon — kuniru al la ĝojo — vivu la plezuroj! Per plezuro al paco! kaj vi, nu, vi estu nia knabino de plezuro — per tio vi plej multe servos al via afero...

La anĝelo pripensis, ke oni kelkfoje devas ion oferi por sia idealo. Tiun nokton ŝi laboris por la paco kune kun la delegitoj. En la matena krepusko oni trovis ŝin, ebria, senvesta, dormanta kiel porko en la stratkoto.

II. PRI STRANGA ANĜELO DE PACO.

Dum Aŭgusto Holando — la klasika lando de fromaĝo, de butero, de mondopaco kaj de brando — estis vizitata de stranga pacanĝelo.

Ŝajnas, ke Historio permesas al si, de tempo al tempo, farcon. Kvazaŭ por moki kun tiu plej nova sporto: la burĝa

paca „movado“, ĝi naskis pensojn pri paco eterna en la kapon de homo, kiu en nuntempo estas la plej komplete simbolo de l' kapitalista barbareco kaj la plej pura tipo de l' moderna rabokaviliro; de homo pli aŭtokrata ol rusa caro aŭ ol antikva persa satrapo, la plej naŭziga specimeno de moderna kapitalisto-sovaĝulo.

La pacanĝelo, kiu vizitis nin, estis, kaj estas, la enkarniĝinta Minotaŭro de l' greka fabelo. Ĉiutage li detruas ekzistojn de aliaj homoj, ĉiuhore li transdonas novan amason al mizero. Li, ĉionpova potenculo, per ĉiuj rimedoj neebbligas la potencigon de tiuj, kiuj laboras por li por salajro. Ĉiun kontraŭstaron li punadas per malsato. Ĉiam pli riĉigante, li submetas al si eĉ la ŝtatopotencon, subaĉetante oficistojn kaj deputitojn de l' popolo. Li spekuladas, intrigas, malbonigas; li semas ĉie degeneradon. Ebria pro potenco, li kolektas la vivantan koton de l' grandaj urboj, apaŝojn kaj banditojn, kaj formas el ili privatan armeon da strikrompantoj, destinitan lamigi tiujn, en kiuj la espero pri liberigo ekflamigis la kuraĝon por batali. Kaj ĉiom da civilizo, kiun homaro produktis, li reduktas al moko al honto. Artajn trezorojn li foraĉetas el landoj malriĉigintaj; li fuŝ-miksas ilin en siaj palacoj kun la plej krudaj imitaĵoj, fi-venditaj al li de flatantaj trompisto.

Tiu anĝelo de paco igas iri tra la mondo, se lia malsato al gajno tion bezonas, falsajn famojn pri proksimiganta milito; per siaj gazetistoj li incitas, se necese, unu popolon kontraŭ alia; li semas maltrankvilon en ĉiuj partoj de l' globo, kaj trempas, se tion al li konvenas, tutajn mondpartojn en teruro kaj timo pri minacanta milito.

Tiun viron, monstro super ĉiu fantazio, elektis farcema Historio por ludi la rolon de anĝelo de paco! Carnegie, la amerika plutokrato, la usona trustreĝo, le dolar-diablo de l' nova mondo, la mono-monstro de Nov-Jorko — lin Historio elektis por starigi la eternan pacon sur la tero! Li akceptis la rolon, li donacis monon, mil biletojn de mil guldenoj! por konstrui pacopalacon. Ĝi estas malfermita en Hago, Nederlando, 28an de Aŭgusto. Ĉiuj regantaroj, kvankam premante siajn popolojn per ĉiam pli pezaj militaj ŝarĝoj, sendis donacojn, por beligi tiun pacopalacon. Oni laŭdis, prikantis, incensis la doninton — li mem ĉeestis al malfermo de tiu palaco en Hago.

La pacpalaco funkcias — la militoj povas komenciĝi!

La markola tunelo.

Antaŭ kelke da jaroj, multaj angloj interesiĝis pri, kaj diskutis, ĉu estus bone tranĉi tunelon inter Dover (Anglujo) kaj Calais (Francujo), por ke oni veturu vagonare inter Anglujo kaj Francujo kaj tiel nenecesigi la malagrablan marveturon, kiu marmalsanigas tiom da homoj! Projektoj estis farataj, sed pro iaj kaŭzoj, kiujn mi jam forgesis, oni lasas la proponon.

Lastatempe la konstruo de markola tunelo denove estas diskutata de spekulaciistoj kaj interesatoj. Kompreneble, tia tunelo estus bona por komerco kaj turismo inter la du landoj, sed la ŝovinistoj malhelpas, kiel kutime, ili ĉiam preparolas militon; kvankam ekzistas „la kora bonkompreno” inter la du landoj, iuj ne fidus unu la alian, kiel vi vidus per la sekvanta traduko de letero aperinta en „The People” (La Popolo) 24/8/13.

„Rigardante la proponon laŭ privata vidpunkto, kaj kiel iu, al kiu marveturo estas treege malagraba, mi sentus tre fortan inklinon apogi iajn rimedojn ebligantajn vojaĝi al kontinento sen la malagrablaĵoj de marveturo. Sed la propono ne devas tiel esti rigardata; ĝi devas esti studata laŭ nacia kaj strategia vidpunktoj, kaj de tiaj la propono devas esti senhezite kontraŭparolata. Unue, ĉar pro la konstruo de markola tunelo ĉi tiu insulo jam ne estus insulo, kaj, due, ĉar, dum milito, la riskoj de tera invado, kaj de malamika estreco de la tunelo, estas tro grandaj por esti entreprenataj. Estas facile paroli pri ia aparato, kiu, per premo de puŝbotono, detruus la tutan tunelon kaj senutiligus ĝin al invadantoj, sed kiu garantios al ni, ke, pro subita surprizo, la malamiko ne akiros la puŝbutonon de la aparato?

Ankaŭ, estas la risko de subitaj militaj panikoj, kaj ne estas multe da utilo konstrui tunelon, kiun oni detruos nepre ĉiujare. Tial mi nur vidas la forlason de la projekto. Militaj kompetentuloj, homoj, kiuj komprenas tion, kion ili preparolas, tute kondamnas la ideon, kaj estas certe ke la komforto de malmultaj privatuloj ne devas esti akirata je ia risko al la bono de la nacio”.

Kompreneble, tia tunelo estus tre utila al Eŭropanoj kaj ni esperu, ke blinda ŝovinismo ne malhelpos la efektivigon de ĝi.

„Ruĝa Leono”.



Interesaj ciferoj.

Malpliigo de l' naskiĝoj en Germanujo. La ĵus aperinta statistiko pri edziĝo, naskiĝo, morto en Germanujo, montras daŭrantan malpliigon de l' naskiĝoj. Po 1000 loĝantoj okazis:

	Edziĝoj.	Naskiĝoj.	Mortoj.
1906	8.2	34.8	19.2
1907	8.1	33.2	19
1908	8	33	19
1909	7.8	32	18.1
1910	7.7	30.7	17.1
1911	7.8	29.5	18.2

Metiomovado en Svedujo 1912. Aperis la ĵar-raporto 1912 de l' sveda Metio-ligo. En tiu jaro la nombro de l' membroj pliiĝis de 85.522 al 92.187. La aliĝintaj societoj havis en tiu jaro 345 konfliktojn: inter tiuj estis 283 pri salajro, nome 239 atakoj (de 17.849 laboristoj kontraŭ 774 entreprenantoj) kaj 44 defendoj (de 3358 laboristoj kontraŭ 52 entreprenantoj). Rezulto: 8593 laboristoj pliiĝis per kontrakto sian salajron kun 17.586 kronoj posemajne (po kapo do kun proksimume 2 kronoj = 1.10 Sm.): 4203 laboristoj malpliigis sian labortempon kun 14.381 horoj posemajne (meze do 3 h. 35 m. po laboristo). Pro striko perdiĝis en 1912: 116.157 labortagoj; pro „elfermitoj” 156.069 labortagoj. El la kaso estis pagataj al strikantoj kaj elfermitoj: 466.641 kronoj.

Analfabetoj en Belglando. En Belglando, kie jam de longe la tuta elementa instruado estas elliverita al la eklezio, la nombro de l' analfabetoj estas terurige granda. Oficiala raporto deklaras, ke el ĉiu 100 belgoj pli ol 8 jaroj nur sciis legi kaj skribi:

1880:	69.04	1900:	80.88
1890:	79.73	1910:	86.90

En la provincoj Luxemburg, Namur, Liège kaj Limburg estas malplej da analfabetoj; plej multe da ili en Flandro kaj en Hainaut (Henegouwen).

Estis analfabetoj en tuta Belgujo:

	Viroj.	Virinoj.	Entute.
1909	468.063	581.329	1.049.382
1912	363.214	450.505	813.719

En la walonaj provincoj, kie eklezio estas malpli potenca ol en aliaj partoj de Belgando, estas samtempe malpli da analfabetoj ol aliloke.

En Flandro, kie la pastroregado estas absoluta, estas plej multe da analfabetoj: inter la 15—30-jaruloj 10 %, inter la pliaĝuloj 25 %!

Psalm' de Laboro.

Dum jarcentoj mi servis homaron. Dum epokoj mi portis la ŝarĝojn de l' mondo.

Mi trafosis la teron. Mi igis ĝin fruktdona.

Mi devigis dezerton floradi, mi ŝanĝis sovaĝejon en ĝardeno.

Mi rikoltis la grenon. Mi rikoltis la fruktojn.

Mi nutris la mondon. Mi zorgis por la tuta popolo.

Mi kvietigis sovaĝajn bestojn kaj faris ilin servantoj de l' homo.

Mi teksis fibrojn je vestoj. Mi vestis la popolon.

Mi renversis montojn kaj transformis rokojn en homajn loĝejojn.

Mi faligis gigantojn de l' arbaro por doni al la homoj komforton kaj protekton.

Mi malsupreniris en la inteston de l' tero kaj devigis ĝin cedi ĝiajn trezorojn.

Mi produktis en la brulo de l' fornegoj, ne timante la siblon de l' vaporo nek la sonon de l' ŝtalo.

Mi riĉigis la naciojn. Mi produktis la lukson de l' mondo.

Sed miaj okuloj estis blindigitaj, kaj miaj manoj estis en katenoj.

Mi ne komprenis, ke la abundeco de mi kreita, estas mia: nek ke la bonoj de l' vivo apartenas al mi.

Sed la ŝeloj ekfalas de miaj okuloj. Mi ekvidas.

Mi stariĝos en mia forto. Mi rompos ĉiujn katenojn.

Mi prenos tion, kio apartenas al mi. Mi metos manon sur la mia.

El „*The International Socialist*“, Sydney.

SOCIA MOVADO.

El Franclando

Anarĥista kongreso: ĝi okazis la 16-17-18 de Aŭgusto, kaj havis sukceson, kiun ne atendis multaj kamaradoj.

Efektive, en anarĥismo, la opinioj, la pensmanieroj ne estas tute samaj; mi devus diri, ne *estis* tute samaj, eĉ ili ofte *estis* malsamaj, ĉar de la kongreso estas, ne unueco, en la senco ĝenerale uzita, sed estas interkonsento pri ĉefaj, fundamentaj principoj.

La plej ĉefa diferenco inter anarĥistoj, estis inter la komunistaj revoluciemuloj kaj individualistoj. Ĉe la kongreso la disiĝo inter ili efektiviĝis, do la interkonsento estis farata inter komunistoj.

Individualismo estas kontraŭ plibonigi de la socio, ĝi celas nur plibonigi la individuon, por individua plezurigo. Ĝi konsideras la amason, por ĉiam, stulta, ne inda ke oni sin oferu por ĝin liberigi.

Antaŭ l' individuo, ĉio devas cedi, homoj kaj aĵoj. Ĉiu barilo estas forigita.

Tiu teorio kondukis junulojn je mortigo. Ili mortigis por ŝteli monon. La ekspluatanto, kiu ŝtelas siajn laboristojn, prenante la plej dikan parton de tiu laboro, kiun li ne faris, estas individualisto.

Tio ne estas anarĥio, ĉar anarĥisto ne batalas kontraŭ la estroj por anstataŭi ilin, nek li batalas kontraŭ la mizero ĉar li estas mizerulo, kaj riĉiĝinte trovas ĉion bona.

La apartigo estis necesa, ĉar la malbonaj agoj, kiujn ni rezignis en niaj jurnalaj, pro ne amasa diskonigo estis atribuatataj al ĉiuj.

De nun, konfuzo estas neebla.

Komence mi diris ke multaj ne kredis je sukceso de anarĥista kongreso. Mi klarigas tion.

Krom la individualistoj, kiuj estas burĝoj sen kapitalo, inter la komunistoj estas preskaŭ tiom da anarĥismoj kiom da anarĥistoj.

Neniu regulo, aŭ devigo kiel en partio samkonformigas — almenaŭ ŝajne — la ideojn.

Oni konsentas pri ĉefaj punktoj, sed rilate tiujn fundamentojn, la graveco de tiu aŭ alia naskas diferencon, diversecon.

Oni do timis, ke diverseco naskos obstinecon; sed ĉio malbona estis vana.

La diverseco estas en la naturo, tamen harmonio regas, ĉio estas en bona ekvilibro.

En la anarĥiistaro estis harmonio.

Antaŭ ol montri la diversajn laborojn faritajn de la kongreso, mi volas citi la opinion de kamaradino Maria Kygiev el Italujo, kiu ĉeestis la kongreson. Mi ne faras tion pro manko de modesto, sed por forigi la opinion, ke anarĥiisto estas senĉaŭgulo, malordemulo, haosamanto.

„Fine, mi devas diri, ke mi estis mirigita de la multo da inteligentaj kamaradoj, kleraj kaj perfektaj oratoroj, kiuj paroladis en la kongreso. En Italujo, ĉe la anarĥiistaj kongresoj estas nur tre eta malmulto, kiu scias paroli konvene.

Tiu fakto pruvas la superecon de la franca popola kulturo, kaj al mi ŝajnas ĝustigi la esperojn kiujn la revoluciema internaciularo bazas sur la francaj kamaradoj, ĉar l' instruiteco, la spirita valoro de la subpremitoj ribelantaj estas gravaj en la fina venko de ilia emancipanta movado.”

Ĉe tiu kongreso ne estis voĉdono. La kunvenintoj nomis prezidanton, kiu devis enskribi la oratorojn.

La ĉefaj demandoj havis ĉiu raportanton. Pri ĉiu raporto estis diskutata, ĉiu kongresano donis sian opinion se li tion juĝis necesa. Ĉiu prenis la plej bonan parton, kiun li povis, el la argumentoj. La nombro de oratoroj ne pruvis ke tiu aŭ alia ideo estis plej bona, kaj la plejmulto ne trudis sian opinion al la plejmalmulto.

Harmonion per libereco konservis la kongreso.

La proksiman fojon pri la laboroj.

A. PANLOU.

El Rusujo.

En nuna tempo nia ortodoksa pastraro tre multe disputas pri disvastiĝo de l' diversnuanca sektaneco; ili atakas scienccon, malbenas ateistojn, konsilas al la registraro forpeladi malpiajn instruistojn, forprenadi danĝerajn librojn k.t.p. k.t.p. Unuvorte, per piaz rimedoj defendas sanktan aferon; sed pri efektivaj kaŭzoj kaj pri efektivaj kuraciloj neniu vorton vi povas ekaŭdi

Servuteco preparis kaj edukis bonan brutaron el rusaj vilaĝanoj; sed por ĉiu mensogeco kaj malvereco estas sia limo. Okazintaĵoj de 1905a jaro montris bone al la vilaĝanoj kaj laboristoj, ke la plej sindona defendanto de nuna absolutismo estas pastraro, kaj plej sincera kaj aminda amiko de nigrcentanoj estas ankaŭ sama pastraro Post dis-

pelo de unua rusa parlamento por politikaj krimuloj komenciĝis efektiva inkvizicio Oni mortigadis ilin diversmaniere sur ĉiu paŝo. Sed pastroj — profetoj de Kristo! — ĉu ili kondamnis ĉi tiun bestfaradon? Ne! Ili benadis ekzekutistojn; ili komuniigadis la viktimojn kaj kondukis ilin kune „kun sankta krista sango kaj korpo” al pendigilo Kiam kolektiĝis dua rusa parlamento, episkopoj de parlamenta tribuno, en nomo de tuta pastraro, defendadis mortpunojn Ĉu tiuj ĉi kaŭzoj ne sufiĉas por veki brutan cerbon? Ĉu mankis materialo al vilaĝanoj por meditado? Jes!!! Ĉi tiuj okazintaĵoj ne povis traflugi nerimarkeble; ili vekis dormintajn cerbojn de simpluloj kaj altrudis urĝajn demandojn: Kial pastroj predikas „Ne mortigu” sed aprobas kaj subtenas diversmanieran mortigadon de l' registaro? Kial ili donas komunion je sankta sango kaj korpo de l' Kristo, sed pendigas ĝin kun kondamnito kaj pelas inferon? Kial ili konsilas fordonadi surtuton al tiu kiu prenis vian ĉemizon, sed mem mortigas homon pro peco da pano? Kial Dio ordonas al la homaro ami siajn malamikojn, sed mem preparis al siaj malobeemaj kaj petolemaj infanoj eternan inferon k.t.p.? De tiu ĉi meditado kaj demandoj rekta vojo estas al la ateismo; kaj pastraro nun ludas rolon de kokino, kiu kovis kokidojn kaj anasidojn kaj nun preparas diversajn barojn ke anasidoj ne trafu riveron; sed vane: ĉar iom post iom eĉ kokidoj, rigardante amon de anasidoj al rivero, kutimiĝos vizitadi ĝin kaj trinki freŝan akvon Oni devas fari gravan diferencon inter kvartala policejo kaj preĝejo, kaj ne ĝeni per pastraj manoj lernejojn; tiam, nur tiam oni subtenos aŭtoritaton de religio, sed ĉiuj malnovaj rimedoj nur pelas homojn al la ateismo

Kun kora saluto al legantoj de I. S. R

RUSA LABORISTO.

Striko en Ljena, Siberio. — Antaŭ ne longe estas publikigita la registara raporto pri Ljenaj okazintaĵoj (terura mortigo de centoj da strikantaj laboristoj). La vasta detala faktplena raporto de senatoro s-ro Manuĥin, sendita al koncilio de ministroj, estas publikigita nur parte. Ĉio, kio karakterizas la batalon inter militistoj kaj laboristoj, la agadon de administrantoj, la cirkonstancojn mem de la striko kaj kondiĉojn de ĝia apero kaj daŭriĝo k.t.p., ĉio ĉi estas en la publikigita raporto malakrigita, malseverigita. La revizio tamen iom lumigis la Ljenan strikon. La ĉefa atentinda

fakto estas la deklaro de s-ro Manuĥin, ke la striko de la laboristoj en la orserĉejoj havis pacan, ekonomian karakteron sed ne politikan. La senatano deklaras en sia raporto, ke „kelkaj politikuloj-ekzilitoj, dank' al sia malnombro, eta kompare al ĝenerala amaso da laboristoj, ne povis doni al la striko kontraŭregnan karakteron”.

Do, la senatano s-ro Manuĥin, esplorinte la aferon mem sur la loko de la okazintaĵoj, laŭ dokumentoj kaj persona konatiĝo de l' stato de l' afero, deklaris, ke en la striko maleksistis tendenco politika.

Ankoraŭ ĉiuj memoras la paroladojn de estinta ministro de internaj aferoj, s-ro Makarov, kiu forte kaj klare substrekiis la politikan karakteron de la striko. Dank' al tio la perforto aplikita al la strikantoj estus tute konforma al la leĝoj. „Tiel estis, tiel estos”, diris tiutempe s-ro Makarov de alteco de Duma tribunano. Senatano s-ro Manuĥin tute kontraŭe difinis la karakteron de la striko. La ministra konsilantaro tamen prenas en tiu-ĉi demandon malan pozicion: ĝi deklaris ke „la difino de preciza karaktero de la striko” prezentas sufiĉan malfacilecon. Je tiu sama tempo, kiam senatano Manuĥin opinias ke estas necese juĝi s-ron Treščenkov (kavaleria kapitano — mortigisto de pacaj laboristoj) pro lia krima fiinda konduto kaj eksigi lin — la konsilantaro de ministroj opinias, ke necese estas meti la agadon de l' kapitano antaŭ juĝistoj kaj dume s-ron Treščenkov ne juĝi. Alivorte, post revizio de senatano Manuĥin devas esti aranĝita nova revizio de Treščenkov!

La raporto de s-ro Manuĥin estas viva, vera dokumento de batalo inter laboristoj kaj kapitalo en ĝiaj krudaj rabistaj formoj, en siberia „tajga'o” (arbardensejo). La stato de laboristoj en la orlaborejoj, la ekspluatado de ilia laboro de la asocio Lenzotto, la protestoj de laboristoj, la paca ekonomia striko sufokita en sango la 4an de Aprilo 1912 — ĉio ĉi apartenas nun al l' historio. De tiu flanko la revizio de senatano Manuĥin havas sufiĉe gravan signifon.

El gazeto „Zabajkala Novj” (urbo Ĉita),
esp. pastro SERIŠEV.

P. S. Mi kredas ke post kelkaj jaroj s-ro Treščenkov — terura mortigisto de pacaj laboristoj — anstataŭ pendigilo ricevos ian altrangan oficon kaj ordenojn. En rusa monarĥio ofte okazas similaj avansoj de pendiginduloj.

Pastro SERIŠEV.

La 30an de aŭgusto, frumatene, estas ekzekutitaj ses Moskvaj katorganoj. Malgraŭ tio, ke mortekzekuto en Rusujo estas preskaŭ ĉiutaga fenomeno, la nuna ekzekuto faris certan impreson sur rusa socio, ĉar tiufoje la nombro de l' ekzekutitoj atingis 6. Ili estis ekzekutataj por provo forkuri el malliberejo kaj mortigo de unu el la tiranoj-observistoj. La provo forkuri malsukcesis kaj anstataŭ ĝui liberecon ili devis antaŭstari militistan juĝantaron. Vanaj estis konvinkaj paroladoj de pledantoj — sangavida prokuroro senindulge postulis ekzekuton kaj la juĝistoj konsentis kun li. La kondamnitaj apelaciis al ĉefa militjuĝistaro; ĉe ili reviviĝis malforta espero je „amnestio”. Sed, la ĉefa militjuĝejo, konsistanta el personoj, kies manoj ankoraŭ ne sekiĝis de l' sango antaŭe verŝita, la kondamnon konfirmis. Tiam devis ĝin konfirmi ankoraŭ la komandanto de l' armeo de Moskva militada distrikto. De li dependis nun la sorto de l' kondamnitaj. Tiu, kompreneble, la kondamnon konfirmis; li bezonas pli kaj pli da sango, ĉar li ne ankoraŭ perdis l' esperon per tio forlavi de li la malhonoron, kun kiu li kovriĝis dum Manĝuruja „aventuro”. Ĉar inter la kondamnitaj troviĝis unu ftizulo, la komandanto lin „amnestiis”, por ke li povu „resaniĝi” en katorga malliberejo. Tamen la aliaj kondamnitaj havis ankoraŭ unu radion de espero: ili sin turnis al reĝa „favoro”. Pasis la tagoj de turmentaj atendoj kaj ili ricevis respondon, ke ankaŭ tie oni transdonis ilin al morto. Plue apelacii oni nenien povis kaj al kondamnitaj restis nur paciĝi kun sia sorto. Mi ne klopodos priskribi la lastajn minutojn kaj suferadon de l' kondamnitaj: mi rimarkigas nur, ke unu el ili frenezigiĝis, eksciinte la reĝan „favoron” kaj komencis dancadi kaj kanti antaŭ la pendigilo... kaj similaj teruraj okazas preskaŭ ĉiutage en Rusujo.

KAMARADO.

El Usono.

James Farley. En Usono mortis antaŭ nelonge fama persono — James Farley.

Kiu estis James Farley? Ĉu vi ne scias tion? Li estis heroo por libereco! Li amis la liberecon pli arde ol Carnegie amas la dolaron. Por la libereco li vivis, penadis, batalis. En ĝia servo li akiris gloron kaj dolarojn.

Naskiĝinte el gepatroj mairiĉaj, li rimarkis ke la libereco estas multe insidata. Certe, oni nuligis sklavecon, sed se la laboristoj volas labori, tiam okazas ofte, ke strikantaj kole-

goj ĉiumaniere tion volas nebligigi al ili. Ankaŭ la entreprenantoj ne estas liberaj, laŭ la sperto de Farley. Ili kompreneble rajtas dungi laboristojn je salajro, kiun ili opinias sufiĉa. Tio estas justa; ĉar, se la salajro ne kontentigas la laboristojn, tiam ili estas plene liberaj por foriri! Sed, kio okazas ofte? Ofte la malkontentuloj, anstataŭ simple foriri, strikas, por *devigi!* la entreprenanton, ke li donu pli da salajro. La koro de Farley ribelis kontraŭ tia skandala limigo de la sankta libereco. Kaj li fine decidis fariĝi defendanto de la libereco.

Por tiu celo li organizis armeon da strikrompantoj. Se ie en Usono estis granda striko, tiam li aperis kun sia armeo da 1500 viroj. Se tiuj „laboris“, tiam li pagis al ili po kapo ĉiutage 3 $\frac{1}{2}$ dolarojn. Li mem ricevis por ĉiu viro 5 dolarojn po tage. Dum la fervoja striko de la Interborough Railway li gajnis 300 000 dolarojn. Li malsukcesigis almenaŭ 50 grandajn kaj sennombrajn malgrandajn strikojn. Li baldaŭ estis milionulo.

Kia viro, ĉu ne? Vera idealisto, ĉu ne? Moderna idealisto, korpigo de la plej alta, plej bela formo de idealismo — la rentodonanta idealismo.

Ĉu oni povus imagi figuron pli simpatikan ol tiu ĉi Garibaldi de 20a jarcento? Garibaldi kun siaj mil viroj tremigis ĉiujn tiranojn; Farley kun siaj 1500 herooj venkis la insidantojn de l' libereco en almenaŭ 50 grandaj bataloj kaj li akiris per siaj triumfoj gajnon de 1 $\frac{1}{2}$ dolaron po tago kaj po heroo!

Satirika gazeto germana desegnis strikon inter la anĝeloj en la ĉielo, pro la alveno tie de Bebel. Eble tio klarigas la subitan morton de Farley, tuj post Bebel. Eble li deziris rompi tiun strikon, kaj tio estus por li malgranda afero, eĉ se li devus uzi la diablojn el infero kiel laborvolantoj!

Farley, hero' — R. I. P.!

Mensoga Paco.

(Daŭrigo kaj Fino).

Mi konas ankaŭ pliajn, samspecajn, pli malfruajn projektojn. Sed mi ne pensas nun fari la historion de la serba imperiismo. Mi volis konstati ion: ke ĝi ankaŭ nun pli malpli povus profiti je mensoga okazo, por sin manifesti. La serba imperiismo, ankaŭ ĝi estas imperiismo de forrabo. La rimedoj

kiujn ĝi uzis, efektive estas same tiel malmoralaj kaj kondamnindaj.

Ne havante serbojn en Makedonio, la serba registaro klopodis havigi ilin al si per mono. Ĝi semis tie subaĉetadon kaj malmoraligon plej teruran. La serbaj diplomatoj, kiam ili troviĝas en intimeco, mem konfesas tion ĉi. Tiel inter iliaj, mia ekssamideano, estinta soc. demokrato, kiun mi konis en Genevo, dum miaj unuaj studentaj jaroj, kaj kiu pli malfrue fariĝis ĝenerala konsulo de Serbujo en Saloniko, diris al mi antaŭ du jaroj, en tiu urbo, senĝene, ke malgraŭ ĉiu monelspezo, li ne sukcesis fari eĉ unu serbon en Iŝtip kaj aldonis ridante: Pli obstinajn bulgarojn kiel tiuj de Iŝtip mi ankoraŭ ne vidis.

Same tiel malbonaj estas la aferoj de la serba imperiismo en Albanio kaj Novi Bazar kaj ankaŭ en Malnova Serbujo propre dire. Ankaŭ tie ĉi, krom Novi-Bazar kaj kelkaj subdistriktoj de Malnova Serbujo, mankas la etnika bazo.

Cetere, iliaj propraj kunbatalintoj, la grekoj, kiam estas en la intereso de la greka afero, denuncas tiun fakton. Tiel, la pariza gazeto „Le Temps“ represas artikolon de la greka gazeto „Hestia“, kiu plendas, ke al Grekujo oni rifuzas teritorion en Albanio, kie estas nur 141,156 albanoj musulmanaj kaj 351,975 grekoj (sed „Hestia“ ne skribas kiom da tiuj grekoj estas kristanaj albanoj kaj arumanoj), dum al serboj oni cedas teritorion, kie ne estas ol 257,972 serboj kaj 280,997 albanoj.

Ĉu ne estas naive kredi, ke tiu ĉi miliono da bulgaroj kaj albanoj, kiujn la serboj alprenas, submetiĝos sen kontraŭstaro al la serba regado?

Ĉu ne estas antaŭvideble, kontraŭe, ke de nun komencas por Serbujo nigraj tagoj de lukto kontraŭ Albanio kaj Bulgarujo unuflanke, kiuj postulos siajn forrabitajn rajtojn, kaj kun Aŭstrio aliflanke, al kiu ne konvenas granda Serbujo?

Kaj kiu povas nei, ke paco, kiu certigas tiom da monstraj maljustaĵoj kaj tiom da konsciaj subaĉetoj, ne estas mensoga paco?

IV. LA BURĜECO, LA NACIA AFERO KAJ LA SOCIALISMO.

Neniam, eble, la burĝeco montriĝis tiom malkapabla solvi gravan politikan aferon, kia estas la nacia afero; kaj neniam ĝi pruviĝis esti elemento pli danĝera por progreso, paco kaj civilizacio, ol dum la lastaj militoj en la Balkanoj. La fruktoj

de dekjara paca laboro estas neniiĝitaj. Anstataŭ vilaĝoj kaj urboj belaj kaj prosperantaj, leviĝas nun en Trakio kaj Makedonio fumantaj ruinaĵoj; anstataŭ riĉaj kampoj da grenoj, tabako kaj kotono, nun vidiĝas vastaj tombejoj. Dekmiloj da malfeliĉaj turkoj, torturitaj kaj forpelitaj el siaj hejmoj, serĉas rifuĝejon per migrado al Malgranda Azio kaj dekmiloj da bulgaroj el Makedonio serĉas savon en la bulgaraj urboj kaj vilaĝoj apud la limo. La bulgara garnizono el Saloniko buĉita kruele kaj la bulgaraj soldatoj pro tiu procedo de la grekaj aŭtoritatoj sin venĝantaj kontraŭ la senkulpa loĝantaro de Seres, transformita en amaso da solaj muroj, nigritaj pro la flamo de la almetita fajro. Lule Burgas, Kirkilisse, Bulair, kaj Ĉatalĝa, Koĉana, Kukus kaj Iŝtip, vastaj kampoj sur kiuj kuŝas ankoraŭ miloj da kadavroj disŝirataj de lupoj kaj formanĝataj de vermoj, la aero dis-, vastigante ĉien la ĥoleron, kvazaŭ venĝo de tiu ĉi duonmiliono popolo de turkoj, bulgaroj, serboj kaj grekoj falintaj en dek monatoj.

Kaj pro kio ĉion ĉi?

Malgranda, malgrava fakto, sed kiu ricevas tragian simbolismon, montras kial kaj por kiu ĉio ĉi estas farata:

De kelkaj tagoj la aŭdiencoj de la bulgaraj pacaj delegitoj multiĝis ĉe la reĝa palaco. Unu post alia prezentigis al la reĝo Karolo; s-ro Tonceff, Generalo Fiĉeff, S. Radeff.

Kion ili serĉis tie?

Ĉu eble ili pensis postuli por la malfeliĉaj bulgaroj, kiuj pasos sub la rumana regado, lernejan kaj religian aŭtonomion kiel tiu, kiun la rumana registaro postulis por la arumanoj en Makedonio?

Ne! La bulgaraj delegitoj havis, ŝajne, alian mision, pli noblan kaj pli patriotan; ili postulis, ke el la teritorio aneksita al Rumanujo per la konataj procedoj, estu forigata parto, proprajo de la reĝo Ferdinando. Kaj la reĝo Karolo, por montri sian afablecon al la bulgara reĝo, bonvolis modifi la desegnitajn liniojn sur la landkarto. Jen kiel super la malfeliĉo de la popoloj leviĝas la solidareco de la dinastioj.

Kaj poste?

Poste venos tagoj de puno por la pekoj. Per la sama ŝnuro, kiun la rumana oligarĥio levis momente sur la dorsoj de la rumana popolo, por gorgumi la bulgaran popolon, ni ligis niajn proprajn manojn. S-ro N. Jorga, kiu unufoje luktis kun la ondegoj de la rumana forraba naciismo, por fini poste en la plej malnobla maniero, sur la senluma bordo

de la forraba imperiismo, en unu momento rimarkis en la „Rumana Nacio“¹⁾ ke nia malfortiĝo, kiu nature alvenos post nia milito kun Bulgarujo, estos profito por la ekspluatado de la hungaraj naciistoj por klopodi hungarigi la rumanojn de Transilvanio.

Kaj el la tradukoj de artikoloj aperintaj en la hungara gazetaro lasttempe, tiuj kiuj plimulte ĝojas pri la rumana naciismo, pri niaj diplomataj sukcesoj, estas la hungaraj naciistoj. Kompreneble, ilia ĝojo estas „sui generis“.

Ĝi estas kaŝita sub la „sardona“ rido, sub la sentinaj komentarioj per kiuj ili renkontas nian noblan agadon. La naciismo ne povas semi ol la malamon por ke la popolo rikoltu militon kaj politikan reakcion. La sola forto de civilizacio, paco, frateco kaj progreso kiu disiĝas el la ĥaoso de la burĝaj societoj en ruino, estas socialismo.

Kamaradoj el Rumanujo kaj kamaradoj el Bulgarujo! la milito finiĝis; nun komencas la vera milito de la proletario por definitiva paco per la triumfo de justeco kaj proveco.

Ni laboru per niaj ĉiuj fortoj, per nia plena konvinko kaj entuziasmo por la triumfo de la balkana federala Respubliko.

Trad. EM. I. NICOLAU.

La ruĝuloj en Bern.

Dum la 9a Esp. kongreso okazis diversaj kunvenoj de diversnuancaj ruĝuloj. Pri la kunveno de la Liberigstela nuanco I. S. R. ricevis jenan raporton (pri tiuj de la aliaj ne alvenis ĝis nun — 27an de Sept. — raporto; kun granda peno ni povis ankoraŭ enpresii la ricevitan raporton, kvankam ĝi alvenis ne antaŭ la 26an; oni ne plendu, ricevante I.S.R. malfrue):

Nia kunveno okazis la 30an de Aŭgusto en la Universitato. Ĉeestis 21 partoprenantoj, reprezentantaj 8 landojn (Francujo, Germanujo, Hungarujo, Hispanujo, Svisujo, Usono, Bohemujo, Algerio).

Oni malfermas la kunvenon je la 8^{3/4}a.

Kamarado Raimond estas elektata kiel prezidanto, kamarado Ferter estas sekretario. La prezidanto legas la mandatojn.

Estas oficiale reprezentataj la sekvantaj grupoj: Liberiga

¹⁾ Naciista gazeto.

Stelo el Parizo, Fédération Syndicale Espérantiste, Grupo Esperantista de l' Université Populaire el Parizo, Liberiga Stelo el Sotteville, Lyon kaj Sens.

La kamaradoj de aliaj nacioj ne havas mandatojn.

La prezidanto klarigas la aferon pri la organizado. De kelkaj jaroj la movado inter la ruĝuloj multe kreskis. Grupoj estis kreataj kaj oni povas pensi ke la momento estas taŭga por organizi tiujn grupojn en Internacia Federacio.

Tamen, danĝero estus se la ruĝuloj dividiĝus en anarhistoj, socialistoj, sindikatistoj k.t.p. Malgraŭ la progresoj de la Esperantismo inter la laboristoj, ili ne ankoraŭ estas sufiĉe multenombraj por tiu apartiĝo kaj la propagando, laŭ li, suferus pro tiu divido.

Li invitas la delegitojn paroli pri la propagando en siaj regionoj kaj diri kion oni pensus ĉe siaj grupoj pri organizado.

K-do Strub salutas el la nomo de Liberiga Stelo el Sotteville. Jam delonge ekzistis en Sotteville disaj progresemoj, sed la senĉesa agado fervojista (postuloj, mitingoj, striko de 1910) permesis starigi la fondon de laborista socialistema grupo nur en 1911a. Kurso komenciĝis al kiu partoprenis 20 fervojistoj. En 1912a, grupo firme starigita kalkulis dekon da anoj. La kurso organizita daŭrigis somere kaj la nombro de la lernantoj pligrandiĝis. La liberigstelanoj ankaŭ kreskis ĝis 15. Oni nur uzas Esperanton por laborista aŭ socia celo (informoj pri labor- kaj vivkondiĉoj en diversaj landoj). Informa oficejeto bone funkciis kaj sukcesis interesi la francan gazeton „Le Libéraire”, kiu enpresis la tradukajojn ricevatajn pri internacia socia movado el Anglujo, Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo kaj Meksikujo. En Meksiko „El Liberal” enpresis artikolon pri Esperanto kaj nian regularon. Reciproke ni donis informojn al angla k-do, kiu enpresigis ilin esperantlingve en „The Anarchist”; kelkaj aliajn angle en „The Syndicalist” kaj „Freedom”, kiuj simpatias Esperanton. Propaganda kunveno ĉe Federacio Fervojista okazis. Idistoj parizaj, kiuj faris vojaĝon por kontraŭdiri, ne sukcesis kaj eĉ neniu Idisto ekzistas en la regiono. Jen rezumita la agado de Liberiga Stelo en Sotteville. Pri Internacia Federacio la delegito deklaras ke, ĉe la grupo, oni pensas ke ĉiuj tendencoj devas resti kunigitaj. Regularo permesas al ĉiu ruĝulo (kiu batalas sub la faldoj de ruĝa internacia flago) aliĝi tutlibere. Starigi specialajn tendencajn asociojn estas fari polverojn de asocio, senfortajn, senvalorajn. Ĉi tie oni sukcesis dank' al unueco, kaj per unueco oni venkos.

K-do Gouchon salutas en la nomo de sia grupo, fondita lastjare. Li parolas pri la neceseco krei laboristan grupon en Lyon. La grupo de Lyon nun havas 50 membrojn, inter kiuj 30 estas Liberigstelanoj. Sinjoro Laisant faris paroladon dum propaganda festo en la laborborso kaj kontraŭbatalis la Idistojn, kiuj, bruante, provis organizi kurson. La grupo havas la aprobon de 30 sindikatoj, kiuj pagas 2 frankojn jare. Pri ĝenerala organizado k-do Gouchon diras ke ĉiuj tendencoj estas en la Lyon'a grupo. Li klarigas, ke en Francujo ekzistas la gazeto „Le Travailleur Espérantiste”, kiu malfacile vivas. Li timas, ke la divido de la fortoj kreigos aliajn ĵurnalojn, kiuj sin mortigos reciproke. La sola rimedo por bona sukceso en nia propagando estas grupiĝi sub nia ĝenerala standardo.

K-do Touzet (Féd. Synd. Esp.) klarigas ke, maisana de longe, li ne povas doni precizajn sciigojn pri sia grupo. Pri la organizado li aldonas, ke la Fédération deziras kuniĝon. Li transdonas al la prezidanto leteron de Habert, sekretario de tiu organizajo, do legado estas farita. Tiu letero certigas la parolojn de k-do Touzet.

Je la nomo de Liberiga Stelo kaj de la grupo de la Universitato Popola el Parizo, k-do Raimond parolas kontraŭ la disigo. Li klarigas, ke li ne intencas proponi nun la kreon de Internacia Organizajo, sed instigas la ĉeestantojn studi la demandon kaj prepari la taskon por la Pariza Kongreso 1914. Tie, tre certe, multe da kamaradoj renkontiĝos kaj povos, post diskuto, fine starigi Internacian Federacion. Tiu diskuto estas, de nun, malfermita en la socialista gazetaro.

Neniu petas ankoraŭ la parolon. K-do Strub demandas germanan kamaradon pri la deziro de liaj samnaciuloj rilate al tiu afero. La kamarado respondas, ke ili deziras la disigon.

K-do Raimond preponas sendi leterojn de simpatio al la revoluciema gazetaro. La propono estas aprobita. Li komisiis ĉiun kamaradon zorgi tiun sendon rilate al lia lando. K-do Ferter legas la tekston.

Ankaŭ salutoj estas senditaj al „Internacia Socia Revuo”, (ne ricevita, Red.), „Le Travailleur Espérantiste”, „Antaŭen”, „La Kulturo” kaj „La Hina Socialisto”.

La kunveno finis je la 10a.

La Raportanto A. RAIMOND.

La socialistaj esperantistaj gazetoj estas petataj represigi tiun ĉi raporton.

ESPERANTA MOVADO.

Rusujo. — Tre rimarkinde estas en nia lando: en plej mallumaj anguletoj kaj plej malgrandaj urbetoj, havantaj nek fabrikojn nek organizitajn laboristojn, troviĝas esperantistaj laboristoj, kaj Esperanto progresas inter simpluloj, sed en grandaj urboj kie laboristoj estas organizitaj, Esperanto malsukcese disvastiĝas. Kial? La gvidantoj kaj la ĉefoj de laborista movado rigardas ĉi tiun aferon kiel superfluan aferon, ili timas ke laboristoj deflankiĝos de sia urĝa celo; ili timas ke laboristoj estas tre malkleraj kaj elspezos multe da libera tempo por ellernado de Esperanto; sed kial do ili mem ne volas ellerni lingvon internacian, kial ili mem ne montras bonan ekzemplon per sia agado? Ili forgesas sian propran devizon: „Proletarioj de ĉiuj landoj, kunigu!”; ili per sia konduto pravas, ke ili konscie malŝatas, malestimas kaj ne kredas sian propran predikadon. Ĉu lingvo internacia estas superflua unuigilo? Ĵurnaloj de laboristoj, inspirataj de samaj ĉefoj, obstine silentas kaj rigardas ĉi tiun movadon malame, dum progresemaj kaj burĝaj ĵurnaloj propagandas ĝin, laboristoj ne volas eĉ aŭdi, ĉar iliaj ĉefoj silentas kaj nenion ordonas, dum memstare laboristoj nenion povas fari, kvankam ĉi tio montras postsignojn de l' sklaveco Oni devas memori, kiom da vanaj viktimoj pereis, pereas kaj pereos en Rusujo! Sed donu al laboristoj Esperanton; ili fariĝos pli viglaj, pli agemaj kaj pli liberaj; ĉar en ĉiu danĝera kaj minaca situacio ili povus transflugi landlimon kaj trovi tie kamaradojn, amikojn kaj laboron

Se ĉefoj ne volas ĉi tion kompreni, tiam ili rigardas laboristaron kiel brutaron Povas esti, ke ĉefoj rigardas Esperanton kiel malpretan kaj malbonan lingvon kaj atendas ĝis kiam fine ĝi estos plibonigita kaj bonpreparita; sed, memoru, karaj ĉefoj: ne atendu diversajn plibonigaĵojn! Kaptu fundamentan Esperanton kaj uzu ĝin; ĉiu plibonigaĵo iras de reacia flanko, kaj trafas mortigi nian unuigilon. Ĉiujn plibonigistojn kaj idistojn (kvankam ili nomas sin „amiki di homi”) ni rigardas kiel plej danĝerajn malamikojn de nia unuigilo kaj kiel subaĉetitajn servistojn de l' kapitalismo kaj reakcio Ĉu povus ekzisti iu laborista partio, kiu ĉiutage plibonigus kaj ŝanĝus sian programon? Se ni rusaj slavoj, kiujn oni rigardas kiel duonsovaĝajn sklavojn, se ni povas en daŭro de 3—4 monatoj ellerni Esperanton, ĉi tio

pravas, ke ĝi ne bezonas superflajn plibonigaĵojn, kaj ĉiuj efektivaj amikoj de Esperanto povas fiere rigardi antaŭen, kaj esperi, ke ni kunbatalantoj iliaj ne permesos forpreni nian trezoron, kaj defendos ĝin! Antaŭen k-doĵ! kun fundamenta unuigilo . . .

Tutkoran saluton al ĉiuj legantoj de I. S. R.

„Rusa Laboristo”.

En Lyon (Francujo), la tiea laborista grupo (sekcio de „Liberiga Stelo”), fondita antaŭ unu jaro, havas nun 50 anojn — el kiuj 20 estas abonintaj al „Travailleur Espérantiste” (Esperantista Laboristo) kaj 7 al „Internacia Socia Revuo”. La grupo estas aboninta al ĉiuj esperantistaj laboristaj gazetoj.

En Aprilo la grupo organizis grandan feston kun parolado de C. A. Laisant, fama scienculo kaj verkisto pri sociaj aferoj, amiko de la laboristaro kaj de Esperanto. Pli ol 700 personoj ĉeestis tiun propagandan feston.

La adreso de la grupo estas: Grupo Laborista, 6 rue Paul Bert, Lyon. Francujo.

Al la kamaradoj de Bilbao. — Kun ĝojego mi eksciis, ke Esperanto progresas inter la laboristaro en Bilbao. Kion k-do Gracia rakontis pri la penoj, kiujn li trovis sur sia vojo, konsolu vin, mi nur povas diri ke tio estas sama kiel ĉi tie en Rotterdam. Sed, tamen, ni ankaŭ progresas, spite ĉiu kontraŭagado. Rotterdam kaj Bilbao estas du urboj, inter kiuj jare centoj da vaporŝipoj veturadas. Ĉu ne estas eble inter la maristoj, kiuj veturas sur tiuj ŝipoj, enporti nian karan lingvon, ĉu ne estas kamaradoj inter ili? Ĉi tie estas tri laboristaj societoj esperantistaj, kies plej granda parto konsistas el socialistoj. Inter la lastaj ankaŭ estas dek havenlaboristoj, kiuj jam povas paroli Esperante. Diversaj Rotterdamaj havenlaboristoj parolas la anglan lingvon, sed mi neniam aŭdis iun inter ili parolantan Hispane. Ĉiutage alvenas ŝipoj ŝarĝitaj je ferŝtono el Bilbao, sed ni neniam povis paroli kun ili. Amiko mia, se vi povas trovi aŭ fari kamaradojn inter ili, diru al ili, mi petas, ke la Rotterdamaj kamaradoj ilin ĉiam atendas en la cigarvendejo de s-ro Pakker, Boompjes 70c, delegito de U. E. A.

Mi kredas ke tiel nia afero tre progresos, ĉar la Rotterdamaj havenlaboristoj kaj la Hispanaj maristoj estos instigitaj lerni nian karan lingvon. Estas pli agrable paroli kun fremdaj Esperantistoj ol kun samlandanoj, ĉar oni tiam povas montri

al ĉiuj ke Esperanto estas taŭga. Tial, faru vian plej bonon. Antaŭe mian dankon.

J. GIBBELS, sekretario de la Laborista Klubo
„La Espejo”, Breedstraat 12a, Rotterdam
Holland

Kiam mi estis skribinta la ĉi-supran, mi devis labori sur la Hispana vaporŝipo Mar Cantabriko. Tuj kiam mi saltis sur la ŝipon, alvenis la ĉefpiloto kaj demandis al mi: „Ĉu vi estas Esperantisto?” Sekvis Esperanta interparolado, kaj miaj kunlaboristoj estis tre mirigitaj.

De nun mi intencas porti ankaŭ la verdan stelon sur miaj laborvestoj, dum mi devas labori sur vaporŝipoj. Mi esperas renkonti kaj fari pliajn amikojn, ĉar tiaj okazajoj puŝas nian aferon antaŭen.

La nomo de nia Hispana amiko estas Gesman Gomez kaj li diris ke li vizitos nian klubon post la sekvonta vojaĝo.

Ni salutas ĉiujn kamaradojn en Bilbao, esperante renkonti pliajn.

Valencia movado. — Ĵus estas fondita en Valencio laborista esperanta grupo, kies nomo estas „Antaŭen”.

Kvankam tie ĉi ne ĉiuj esperantistoj estas tre progresemaj, tamen inter la laboristaro kaj precipe inter la legantoj de I. S. R. naskiĝis la deziro havi laboristan esperantan grupon kaj ni kontraŭ ĉio ĝin faris.

Kompreneble, ĉar ni ne estas riĉuloj, ni serĉis senpagan lokon kaj ĝin volonte donis al ni la ĉi tiea laborista societo de panfaristoj „Laborfarado de la pano” kies sidejo estas Cuarte 34, la etaĝo kaj ankaŭ tiu de laborista grupo.

Ni petas ĉiujn kamaradojn sendi al ni ĉiuspeciajn propagandilojn; ankaŭ estas tre petataj ĉiuj esperantaj laboristaj gazetoj sendi specimenojn por ke ni povu koni kaj aboni ilin. Gis nun ni komencis du kursojn gvidatajn unu el ili de nia tre progresema samideano Josefo Ventura, kaj la alia de la subskribanto.

Kamaradoj helpu nin, sendante al ni adresojn de grupoj kaj propagandilojn.

F. BÀGUENA, Vicprezidanto.

Breslaŭ. — La liberemaj Esperantistoj breslaŭaj de nun regule kunvenas ĉiusabate je 8¹/₂a vespere en „Café-

Restaŭrant” Karlstrato 37. Ĉiu kamarado estas kore invitata. Precipe eksterlandaj kamaradoj estos bone akceptataj „Grupo liberaj Esperantistoj Breslaŭ”.

WILLY THIELKING, Breslaŭ X, Kreuzburgerstr. 4.

BIBLIOGRAFIO.

Verko pri Siberio. Traigardante esperantan literaturon, mi rimarkis, ke popular-sciencia literaturo — geografie-etnografia — estas tro mizera, rilate kvanto. Pri neniu lando estas kiaj ajn libroj nek broŝuroj. Tial en mia kapo venis ideo eldoni en nia kara lingvo volumaron pri Siberio kaj ilustru ĝin per belaj ilustraĵoj. Ĉiu volumo devas pritrakti apartan regionon de Siberio, tiel mi devas eldoni 7—8 volumojn minimume; mi intencas ankaŭ eldoni 1—2 vol. pri Mongolujo. Nu, jen mi havas agrablan honoron anonci la gelegantaron de estimata, aminda ĵurnalo „Int. Socia Revuo” ke la volumo „Siberio I Transbajkalo” nun estas presata en presejo en Belgolando kaj ke ĝi jam estos elirinta el la presejo, kiam tiu ĉi artikolo estos presita en la Revuo. La 1a volumo estas mendebla kaj aĉetebla ĉe la „Centra Komerca Oficejo”, 13 rue des Bouchers, Charleroi, Belgolando; ĝi kostas fr. 375 = Sm. 1.50 afrankite; ĝi havas 150—160 paĝojn de granda formato, 22 ilustraĵojn, 33 rakontojn, skizojn kaj artikolojn, parte originalaĵoj miaj kaj de miaj amikoj, parte tradukaĵoj.

La dua volumo jam estas en preparado kaj aperos en la nuna jaro. Do, gesamideanoj, subtenu mian entreprenon, kiu plibonigos nian esperantan literaturon. Mi kredas ke, dank’ al mia iniciativo, multaj aliaj similaj verkoj aperos pri aliaj landoj.

Pastro IN. SERIŜEV, el Krasnij-Jar,
Siberio, Transbajkalo.

La Voĉo de l’ Popolo, ĉiusemajna ĥina kaj esp. gazeto pri ĉio, kio kondukas socian revolucion kaj progresigas universalan unuiĝon. Jarabono eksterlande Sm. 2.500, 1 ek. 5 sd. Deziras intersangi n-rojn kun ĉiuj esp. gazetoj kaj alilingvaj anarĥ. aŭ socialistaj gazetoj. Adreso: S-ro Sifo, 8 Chiin-Sin-Tung Str., Sai Kwan, Canton, Ĥinujo.

Tutmonda Jarlibro Esperantista. Esperantista jaro 1913—1914. Enhavo: I. Almanako (kronologio;

kelkaj el niaj eminentuloj — fotografajoj de Gen. Sebert, Carlo Bourlet, Gabriel Chavet, Emile Boirac, Th. Cart, Paulo Christaller, A. Grabowski, Ĉefeĉ, kapitano V. Inglada Ors, P. de Lengyel, D-ro Mybs, P. Nylén, R. de Saussure, A. Wackrill; Niaj Akademianoj; Tutmonda statistiko; La unuigo de internaciaj asocioj; Pri la internacia lingvo Esperanto; Berno; Parizo. II. Oficialaj Institucioj. III. Internaciaj fakaj asocioj kaj institucioj. IV. Regionaj propagandaj asocioj. V. Listo de la Esperantistaj gazetoj. VI. Korespondantoj kaj komercistoj. Prezo: frankoj 3.50 (Sm. 1.40). Eldono de „Esperantista Centra Oficejo, Parizo, 51 rue de Clichy.

Socialista Literaturo. — En la proks. n-ro gravaj sciigoj pri nia socialista biblioteko.

KORESPONDADO.

Aŭstralio: K-do H. S. Bennett, 35 Hinemoa Road, Grey Lynn, Auckland, New Zealand, dez. kor. kun gesamideoj en ĉiuj landoj per il. pk.; ĉiam resp.

Germanujo: K-do Hans Müller, Wetzelsgrünnerstr. 29, Treuen i Vogtland, dez. interŝ. gazetojn kaj vidajkartojn kun ĉiuj landoj; ĉiam kaj tuj respondos. — K-doj Karl Rauschenbach, Annenstr. 7, Merseburg, kaj Richard Biebach, Roterbrückenrein 5, Merseburg, ambaŭ dez. kor. per il. pk. kun ĉiuj landoj; sincera propono. — K-do Willy Winder, lignomodelfaristo, Friedrichstr. 30, Offenbach a. Main, dez. kor. kun ĉiulandaj gek-doĵ pri ĉiu temo, poŝtkarte kaj letere.

Aŭstrio: K-do Ant. Ráz. instruisto, Beroun III, Vachlického 70, Bohemujo, dez. kor. p.karte aŭ letere, interŝ. gazetojn; ĉiam kaj tuj respondos. — K-do A. Siška, Buštěhrad, 293, Bohemujo, dez. kor. kun gelegantoj de I. S. R. de l' tuta mondo (escepte germanoj) per il. pk. kaj letere; mi tuj kaj ĉiam respondos, ankaŭ dez. interŝ. poŝtmarkojn.

NIAJ KALKULOJ: En kaso la 20an de Aŭgusto 102.82 guld. Ni ricevis en Amsterdam (ĝis 20 Sept.): Andersson 4.50, Kespert 3, Romeijn 1.37, van Breukelen 1.10, Almond 1.20, Nurmenen 1.63, Seidler 2.50, Haenen 0.60, Süß 2.90, de Jong 1.70, Duce 1.20, Strasser 1.47, vendo ponumera 5, kune 28.17; entute 130.99.

Kamaradoj, kvitiĝu!